Emil Rittershaus,

Vestfalia kanto

tradukita de Friedrich Pillath

1. Vi gloru Rejnon kun fiero
Pro ĝia vinberuja font'-
Sed ni naskiĝis, kie fero
Profunde kuŝas en la mont',
Sur rok' altiĝas abiar',
En val' sin paŝtas la brutar',
Kaj garde staras ĉe la dom'
La kverka arbo kiel hom'.
|: Al vi eksonu nia kant',
Ho vestfalia hejmoland':|

2. Ni ne facile kutimiĝas
Al dolĉaj vortoj, flata dir',
Kaj ne rapide amikiĝas
Kun iu renkontita vir'.
Bonvena estas la fremdul'
Nur kun sincero en okul'.
Parolo rekta al la kor',
Jen estas vestfalia mor'.
|: Al vi eksonu nia kant',
Ho vestfalia hejmoland':|

3. Kaj la knabino vestfalia,
Kun okulsteloj en lazur',
Ne emas al flirtad' pasia
Pro nura distro aŭ plezur'.
De la danĝero la Ĉiel'
Ŝin zorge gardas per anĝel';
En ĝojo kiel en dolor'
Fidela restas ŝia kor'.
|: Al vi eksonu nia kant',
Ho Vestfalia hejmoland':|

. . .

Emil Rittershaus,

Westfalenlied

1. Ihr mögt den Rhein, den stolzen preisen,
Der in dem Schoß der Reben liegt;
Wo in den Bergen ruht das Eisen,
Da hat die Mutter mich gewiegt.
Hoch auf dem Fels die Tannen steh'n,
Im grünen Tal die Herden geh'n,
Als Wächter an des Hofes Saum
Reckt sich empor der Eichenbaum.
Da ist's wo meine Wiege stand,
O grüß dich Gott, Westfalenland!

2. Wir haben keine süßen Reden
Und schöner Worte Überfluß,
Und haben nicht so bald für jeden
Den Brudergruß und Bruderkuß.
Wenn du uns willst willkommen sein,
So schau auf's Herz, nicht auf den Schein,
Und sieh' uns grad hinein ins Aug!
Gradaus, das ist Westfalenbrauch !
Es fragen nichts von Spiel und Tand,
Die Männer im Westfalenland.

3. Und uns're Frauen, uns're Mädchen,
Mit Augen blau wie Himmelsgrund,
Sie spinnen nicht die Liebesfädchen
Zum Scherz nur für die müß'ge Stund.
Ein frommer Engel Tag und Nacht,
Hält tief in ihrer Seele Wacht,
Und treu in Wonne, treu in Schmerz,
Bleibt bis zum Tod ein liebes Herz.
Glückselig, wessen Arm umspannt,
Ein Mädchen aus Westfalenland!

. . .

4. Vin, „ruĝa tero“, gardu Dio
Dum nia tuta vivovoj',
Plenigas via per harmonio
La bruston kaj je kora ĝoj',
Ho Vestfalio, Dia verk',
Kun fort' egala al la kverk',
Vin benos eĉ en lasta hor'
Varmege nia danka kor'.
|: Al vi eksonu nia kant',
Ho Vestfalia hejmoland':|

Traduko de la Germana poemo "Westfalenlied" de Emil Rittershaus *(*1834-04-03 – †1897-03-08) en Esperanton de* Friedrich Pillath *(†1932-04.03) en 1920.*

Arg-329-848 (2010-05-26 15:52:56)

Pri la tradukinto Friedrich Pillath vidu ankaŭ la vikipedian retejon `http://eo.wikipedia.org/wiki/Friedrich_Pillath`.

4. Behüt dich Gott, du rote Erde,
Du Land von Wittekind und Teut!
Bis ich zu Staub und Asche werde,
Mein Herz sich seiner Heimat freut.
Du Land Westfalen, Land der Mark,
Wie deine Eichenstämme stark,
Dich segnet noch der blasse Mund
Im Sterben, in der letzten Stund!
Land zwischen Rhein und Weserstrand,
O grüß dich Gott, Westfalenland !

Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas Emil Rittershaus *(*1834-04-03 – †1897-03-08), publikigita 1868.*

Arg-329-663 (2012-11-30 09:42:53)

Über den Verfasser Emil Rittershaus finden Sie Näheres im Internetz unter `http://www.westfalenlied.de/westfalenlied3/lied.htm`. *La melodio estas aŭdebla en* `http://ingeb.org/Lieder/westfale.html`, *la muziknotoj troviĝas en* `http://www.markomannenwiki.de/index.php?title=Westfalenlied`.